

Privata enketo

de www.planlingvoj.ch (A. Künzli) inter la esperantistaro, majo 2013

Se vi devus respondi al la demando: Kiuj estis lau vi la 10 ĉefaj eraroj de la Esperanto-movado, kiujn erarojn vi mencias?

Ghenerala enkonduka rimarko:

Chi tiu privata, pli malpli spontana kaj tre simpla enketo estis lanchita ĉirkau la 24a de majo 2013 kaj sendita al tricento da retadresoj el al Jarlibro de UEA, ĉefe estraranoj, komitatanoj kaj aktivuloj de UEA kaj TEJO, Landaj Asocioj plus elektitaj delegitoj kaj aktivuloj parte ekster la Jarlibro. Mi atendis 2 semajnojn (la respondoj alvenas kutime en la unuaj kelkaj tagoj). Entute estis rikoltitaj 37 skribaj respondoj de e-istoj el dudeko da landoj (kelkaj aktivuloj promesis sendi sian respondon, sed bedaŭrinde ne plu liveris ĝin ĝhis la redaktofino). Estas karakterize, ke de la centra funkciularo de la UEA-medio neniu respondis, ankaŭ flanke de TEJO ne venis respondo (sed tamen venis la respondoj de iuj reprezentantoj de la junularoj brazila, hungara kaj norvega). Lau la averto de kelkaj kolegoj, kiuj respondis nome de siaj organizajhoj, necesas kompreni, ke ce iliaj respondoj temas pri pure personaj, privataj opinioj). Neniu Landa Asocio de UEA respondis. Ankaŭ la redaktoroj de la Civito, Libera Folio kaj La Ondo de Esperanto ne bonvolis respondi la enketan demandon. Pri la kialoj oni povas nur spekulativi. Unu el la komitatanoj de UEA ech kun evidenta chagreno rifuzis la enketon, kiun li konsideris kiel "spamon". Du aliaj komitatanoj de UEA respondis ech nur ghenerale, rifuzinte la konkretan demandon pri "eraroj" kaj kun la evidenta opinio, ke la enketa demando estas maltauga. La rikoltita enketa rezulto tamen estas suface kontentiga, eble ec iom reprezenta, car la respondoj tushas larghan spektron de tiklaj demandoj de Esperanto.

Shajnas al mi, ke ghenerale oni iom tro malatentis la diferencon au distingon inter "problemoj", "malfaciloj", "mankoj" unuflanke kaj efektivaj "eraroj" aliflanke, sed tio ne tre gravas en chi tiu kazo. La iom ghenerala kaj suprajha enketo-demando permesis al la uzantoj pli larghe respondi kaj esprimi sian opinion pri la temo. La tekstoj estas reproduktitaj chi tie lau iliaj originala retmesagha formo, do sen granda redakto kaj supersignado (despli ke oni postulis ilian forigon), sed kun la plej necesa korektado de etaj eraroj (la tralegado kaj reformatigado de la mesaghoj tamen estas kelkhora honorofica laboro!). La respondoj estas listigitaj lau sinsekvo de ricevo; la aldonitaj numeraloj plifaciligu ilian utiligon. Post rekontaktado de la respondintoj, la koncernitoj ne kontrauis publikigi siajn respondojn anonime (la nomoj kaj landa deveno de la aŭtoroj ne shajnas al mi vere signifaj). Al la partoprenintoj en la enketo mi dankas pro la afabla kunlaboro.

Jam en antaŭaj jaroj mi faris similajn enketojn inter la UEA-delegitaro pri specifaj demandoj. La rezulto estis publikigita sur www.planlingvoj.ch. Andreas Künzli, Svislando.

RICEVITAJ RESPONDOJ

Tia tasko superas miajn mensajn kapablojn - kaj estas ekster mia intereskampo.

1.

1 - mistakso de la rolo de la E-organizoj post la fino de Malvarma Milito (ĉar la organizoj nun ludas nur malgrandan kaj malgravan rolon - sed havas tute alian opinion pri si mem)

2 - mistakso de la faka laboro (ĉar ĝi estas neglektita, sed grava, eble la plej grava faktoro por ***apliki*** E-ton)

3 - mistakso de la rolo de diversaj aĝogrupoj (Mi lernis de vi, ke junuloj kutime ludas malgrandan rolon en la movado. Do estas du taskoj: 1 * gajni pliaĝulojn por E-to ; 2 * atingi la lernejojn, por ke fine junuloj ludu pli gravan rolon)

4 - mistakso de la kunlaboro kun politikaj internaciaj organizoj kaj de la efiko de registaroj, do: E-to de supre aŭ de malsupre; klara respondo: E-to desupre, kaj la kunlaboro kun internaciaj neesperantistaj organizoj havas neniun proveblan utilon krom interŝanĝo de afablaj leteroj kaj multekostaj vojaĝoj)

5 - neglekto de Eŭropo (la kontinento) kiel centro de la movado (por ĉiu triamonda nova e-tisto ni perdas cent eŭropanojn)

6 - supertakso de la efiko de "unuiĝo de Eŭropo" (mi estas kontraŭulo de EU!)

7 - tro granda influo de maldekstraj fortoj kaj sekva (unuflanka) politikiĝo de la movado, el tio sekvas (1), (2) kaj (4)

8 - supertakso de la interreto (1 * mi ne kredas, ke la nombro de esperantistoj kreskas, kaj ĝi certe ne kreskos sekve de E-lingvaj retejoj; 2 * mi ne kredas, ke iu homo povas lerni iun lingvon en interreto, se iu "lernas" ĝin, tiam li ne povas paroli ĝin.)

9 - eble: subtakso de la lokaj E-grupoj (kp. (5))

10 - Baza eraro: Esperantistoj estas aktivaj homoj, kiuj partoprenas LA vivon. Vere la plejmulto estas enuigaj stranguloj kaj freaks, kiuj okupiĝas ĉefe pri si mem (supre de la kokso) kaj ne plu trovas ludejon en aliaj malgrandaj movadoj. Vi rajtas pensi la saman pri mi.

2.

Movado - kiu ajn, ne nur por la neuxtrala internacia lingvo - estas socia fenomeno, kies ekzisto dependas ne de volo de apartaj gvidantoj aux decidoj de iuj superaj organoj. Do, movado, kiel tia, ne povas "erari" aux agi gxuste, este rezultanto de agado de cxuiuj siaj partoprenantoj. Sukcesoj kaj malsukcesoj de la movado dependas de gxia gxenerala koincido aux malkoincido kun bezono de la socio, en kiu gxi funkcias.

En rauxmismaj terminoj movado estas unu el funkcioj de la esperante parolanta komunumo, direktata eksteren kaj internen, do, la popolo. La popolo ne povas "erari" - gxi simple ekzistas dum certa historia periodo.

Alia afero estas eraroj de konkretaj organizoj de esperantistoj - UEA, SAT, ISAE, E-civito kaj cxuiuj ceteraj internaciaj, naciaj ktp. organizoj (gxis lokaj societoj kaj kluboj), agantaj laux volo de elektitaj aux sinproklamantaj gvidantoj, komunaj kunvenoj, kongresoj, konferencoj ktp. Sed cxiu el ili faras proprajn erarojn, relative sendepende unu de la alia.

Same popoloj (etnoj, nacioj) ne eraras, povas erari la instancoj, kiujn produktas tiuj popoloj (sxtatoj ks.).

Do, la demando estas starigita absolute malkorekte.

3.

Mi ne scias. Mi ne kredas, ke la movado faras multajn erarojn, mi kredas ke la tempo kaj precipe la hegemonio de la angla lingvo estas kontrau Esperanto kaj aliaj planlingvoj.

4.

Tiu eraro, kiun mi nomus la plej gravan, estas, ke movadaj esperantistoj kredis kaj kelkparte eĉ ankoraŭ kredas, ke ekzistas politikistoj, kiuj interesiĝas pri nia afero.

5.

Kredi, ke la Esperanto-movado ne povas esti enfiltrita de la sxtato same kiel estas aliaj 'alternativaj' movadoj.

6.

Mi ne povas mencii dek erarojn, sed kiel plej ĉefajn mi mencius:

- Suspekto kontraŭ komercado, en kombino kun la ofta honoroficado tio malfaciligas perlabori per E-o (en la germana oni parolas pri "Gratiskultur")

- Neintereso/manko de konscio pri necesa profesiigo de la movado
- Primitiva propagando kun ofte malveraj argumentoj ("logika lingvo kun 16 reguloj senesceptaj")
- Kontentiĝo kun mezvaloraj enhavoj (ekz. jubelo pri "sukcesa arta konkurso", kiu fakte enhavis nur banalajn verkojn)
- Emo komenci daŭre novajn projektojn kaj manko de sukcesa fino de tiuj projektoj

7.

Estas tikla problemoj, ĉar la eraroj ne estas sendependaj.

Frua eraro estas la malĝusta reago al IDO.

Esperantistoj kverelis ĉe institucioj, kiuj estis principe favoraj al internacia lingvo, sed pli kaj pli malŝatis la dogman kaj arogan agadon de Esperantistoj, kiuj ne pretis akcepti reformojn aŭ aliajn projektojn, ĉar laŭ ilia opinio Esperanto provis la taŭgecon.

Fakte la temo de internacia lingvo malaperis el la internacia komunikado ekde 1920.

Dua eraro estas la strikta malakcepto de ŝanĝoj (fundamento). Foje bonvolaj kaj influhavaj homoj opiniis, ke modifita Esperanto povus esti pli sukcesa.

La rezulto estas dogma kontrolo de bona lingvo kaj vortaroj, kiuj ne respegulas la aktualan vivon. Kun esceptoj.

Tria eraro estas la desuprismo, la fido, ke iu grandpotenco enkondukus Esperanton.

Kvara eraro estas la dogma fido al la "alta" kulturo. Oni kutimas laŭdi tradukojn de popularaj malnovaj verkoj, kiuj jam ekzistas en la plej multaj lingvoj. Estas certaj Esperantistoj, kiuj ĝuas la lingvon. La informo - ĉu la teksto diras ion novan - ne gravas. La Esperanto-movado delonge ne plu estas parto de progresemaj movadoj, sed rekonas ilin kun distanco de 20 jaroj, kiam ili ne plu estas progresemaj, sed akceptitaj. Mankas facile legebla, interesa, aktuala literaturo. Oni ĉiam volas pruvi, ke Esperanto sukcesas krei "grandan" literaturon. Tial la libroservoj vendas precipe vortarojn.

Kvina eraro estas, ke Esperanto ne estas preta prezenti sin en la servo de alia ideo. Precipe malgrandaj ideologiaj aŭ religiaj grupoj kun tutmonda strukturo havas la problemon de lingvo aŭ traduko. Esperantisto, kiuj servas por pretigi pontolingvon, povus altigi la reputacion. Kutime la Esperantistoj, kiuj havas similajn interesojn, ne scias pri la aliaj. La fakaj organizoj stagnas aŭ ekzistas sole sur la papero.

8.

Tute sincere... Nun, je la stato de majfino de 2013... La ĉefa eraro (malfeliĉo/misokazo) estis LA EKESTO de la movado.

Se eblus reveni pli fruen, al la jaro 1999, mi ne komencus lerni ĉi tiun lingvon.

9.

(1) Tro malmulte da varbado - sed ŝanĝi tion kostus multe,

(2) Manko de profesiuloj kiuj zorgus pri bonaj publikaj rilatoj, kun prominentuloj, politikistoj kaj ĵurnalistoj, kiuj aranĝas eventojn interesajn por la vasta publiko kaj tial por gazetoj kaj televido - sed tion mi ne povas postuli de la movadanoj, ĉar kontraŭe al la industrio ni ja ne perlaboras nian monon per la sukceso de Esperanto.

Do ke tio ne funkcias kontentige, ne estas eraro.

10.

Se mi scius tion, mi konus la respondon pri la solvo, sed mi ne certas chu miaj suspektoj pri eraroj estas ghustaj. Mi havas nur unu: troa sekteco kaj enfermiteco (kvankam mi konscias ke ghuste tiu savis la movadon en tre krizaj tempoj kiel mondmilitoj kaj teruraj cirkonstancoj en diktatoraj landoj, kaj do ankau tiu aspekto havas certan bonan kauzon por ekzisti).

Plia eraro kiun mi trovas (sed ne certas ke ghi estis vere eraro) estas ke la E-a movado chiam evitis kontakton kun la materia mondo, nome komplete malzorgis pri la ekonomiaj aspektoj de la vivo. Ech oni ofte malpermesis la aktivadon de tiuj esperantistoj, kiuj ion faris profitan. Ech homaj aktivadoj plene spiritaj kiel la religioj longdaure vivas nur se ili bone evoluigas la enspezan flankon de sia laboro. Tiuj kiuj ne zorgas pri tio, baldau malaperos. Vershajne tio kion esperantistoj trovas en la ideologio de esperantismo (cheefe iun lokon kie ili povas babili en internacia societo) estas hombezono kiun oni povus pli multekoste vendi, sed la Movado shajne konstante malamikis kun la ideo pri profito.

Eble tamen prave, char ja chiu ekonomi-profita agado kondukas unuflanke al danghero pri kreditoj (tro shuldighi kaj sklavighi) au la danghero instigi al monshtelo (kio ja fojfoje okazas ankau en la nuna movado), kio povus forte endangherigi la Movadon.

Do, sen rilatado al la reala materia mondo ni ne povas kreski, kun ghi ni eble detruus nin. Sed mi tamen kredas ke neprus riski - ja sen risko estas neniun progreso.

Shajnas al mi ke strategie la Movado neniam eraris, char ghi simple daure sekvis la idearon de Zamenhof. Tiuj kiuj klopodis malrespekti la bazan dogmon intertempe malaperis au plene marghenighis (ekz. SAT au la idistoj). Do, la nura ebla konkludo estas ke la movado sekvante la Zamenhofan dogmon agis lau la nura ebla maniero travivi kaj pluvivi.

Chu ekzistis au ekzistas iu alia pli bona strategio, oni ne povas scii, char tiuj provitaj ne sukcesis. Taktike chiu pasho dependas de apartaj cirkonstancoj en la loko kie esperantistoj agas. Iu komuna taktika manovrado ne estas ebla. Sekve chiu esperantisto kaj organizo agas lau la propra takso kaj ofte eraras sed ankau klopodas korekti la erarojn.

Resume en la komuna strategio mi trovis nur du aspektojn kiuj shajnis al mi ghenaj (eble eraraj):

1. la troa sektismo bazita je zamenhofa dogmo

2. la malakcepto de la materia vivo (okupighado pri la mono), ankau pro Zamenhof-postuloj

Se tio estas eraroj, tiam ni devus deiri de la zamenhofa idearo en tute neantauvideblan direkton, sed jam vidighis ke kelkaj tiaj provoj fiaskis.

11.

Estas tre malfacila demando. Ĉu ekzistas elekteblaj respondoj?

12.

Unue, la desuprismo, t.e. la naiva espero, ke politikistoj iel subtenus la movadon pro raciaj kauzoj ktp.

Due, la malaprezo de profesiaj konoj kaj spertoj, precipe pri merkato, ekonomiko ktp., kiujn kelkaj partoprenantoj de la movado ja havas. Esperanto vaste estas iel vidata kiel maldekstra afero, kio gxi fakte ne estas au ne devus esti.

13.

Ke ofte oni mencias la regulecon au la facilecon de esperanto kiel avantaghon.

14.

Ne estas la eraroj de individuaj esperantistoj aŭ de la tuta movado, kiuj kaŭzas la nunan nekontentigan staton de Esperanto. Bonvolu ne plu ĉasi sorĉistinojn. Temas pri ŝanĝiĝoj en la mondo multe pli grandaj ol ni. En imperiaj situacioj neniun atentis pri lingva justeco kaj ĉiuj volas paroli la lingvon de la imperiestro.

15.

- 1) Kredi, ke la neakcepto de E-o kushas che esperantistoj, kiam iom da pripenso montras la hipokritan lukton, la kashitan baton de tutmondaj regantaroj kontraŭ ghi (ni memoru pri Societo de l' Nacioj);
 - 2) Kredi je helpo de politikistoj (kiuj au sekvas la ghegeneralan malamon, au fajfas pri E-o);
 - 3) Postuli neatingeblojn, kiel ekz. starigi peticiojn nerealigeblajn (ekz. en Francujo, nun, por enkonduko de E en bakalaurajn ekzamenojn: deko da instruistoj por duonmiliono da junuloj?);
 - 4) Ne flue kapabli sian E-lingvon (E-analfabetoj, manko de bonnivelaj instruistoj kaj instrulibroĵoj...), kaj ne koni la historion de la "movado", kio ĉiam reaperigas la samajn erarojn;
 - 5) Ne kompreni la potencon de la avantaĝoj de NE-ALPRENO de E, por milionoj da homoj (lingvinstruistoj, interpretoj, tradukistoj, denaskuloj en ekz. la angla...);
 - 6) Aperi kiel "stranguloj" (surhavi dekojn da steloj; tede alparoli al nekonatuloj en vagono favore al E...);
 - 7) Ne koni aliajn naciajn lingvojn ol la propran, do ne kapabli diskute rivali kun plurnacilingvanoj;
 - 8) Havi kaj esprimi malamon al naciaj lingvoj, precipe la angla (kial ne malami la vetershanghon, la tempopason...?);
 - 9) Ne kompreni, ke en ĝhia nuna stato, E rolas en la tereno de propraj sentimentoj kaj plezuroj, kaj ne de ĉiutaga konkreta helpo;
 - 10) Ne pripensi, kaj sekve ne kapabli kontraŭbati stultajn argumentojn kontraŭ E, ekz. ke E ne havas kulturon (estas la kulturo en la parolanto, ne en la parolilo; angleparolanta analfabeto estas senkultura; universitata profesoro esprimanta sin en E estas kulturriĉa)...
-

16.

1. La plej granda eraro de la Esperanto-movado estas kredi, ke ghi kaj la esperantistoj povas venkigi Esperanton. La malo ofte estas la kazo: Ili malhelpas Esperanton. Sed aliflanke estas tamen esperantistoj, kiuj saghe agas.
2. Al multaj Esperanto donas sencon en ilia vivo. Ili ŝajnigas, ke Esperanto bezonas ilin, sed ili eraras: Ili bezonas Esperanton, por ke ilia vivo farighu pli eltenebla por ili.
3. La Esperanto-movado estas tute marghena - pro tio ghi altiras marghenulojn, kiuj kvante dominas. Sed la esperantistoj tion ne povas shanghi.
4. Ofte la esperantistoj malkontentas, ke iu alia faras pli efike la laboron, kiun ili mem volas fari. Tiam ili ĵhaluze atakas kaj agresas la aganton, kiu laboras efike.
5. La esperantistoj troigas la forton de la movado.
6. Ilia rilato kun la publiko ofte ne estas sincera, sed bazighas sur malĝusta analizo de la faktoj. La esperantistoj ne povas toleri, se iu ne-mensoge kaj objekte, tamen simpatie kaj pozitive prezentas Esperanton. Ili tion atakas.
7. La esperantistoj tro emfazas tion, kio devus lau ilia opinio esti, kaj ne tion, kio efektive estas.
8. La esperantistoj fidis tro al argumentoj. Sed ĉiu argumentado provokas kontraŭ-argumentadon kaj tiel malkonvinkas en la plej granda parto de la kazoj.

9. Ĝenerale mi dirus, ke la esperantistoj skribas tro da retleteroj. Krome kelkaj el ili estas ret-leteraj sharkoj: ili agreseme atakas virtuale, sed se oni renkontas ilin, ili estas timemaj kaj havas komplekson de malplivaloro.

10. Konklude: La esperantistoj prenas sin tro seriozaj.

17.

Tiu ĉi demando shajnas al mi esti iom tro sugestiva. Pro tio mi ne respondas per deko da punktoj, sed nur ĝenerale.

Lau mia sperto la situacio por vasta uzado de artefarita lingvo en la "ĝenerala publiko" ghis nun neniam estis vere favora. Tio signifas, ke la realo, la faktoj pri ĝia funkciado en komunikado kaj pri ĝia literaturo ne ludas gvidan rolon en la pritaksado de Esperanto. Ĝis nun ĝi estas nura 'mito' por la plejparto de eksteruloj. Tiu situacio ankoraŭ akriĝas per la efiko de altrudema, blinda propaganda fervoro, kiu kauzas la ĝeneralan publikon farighi imuna (rezista): Tiamaniere la propagando grandparte tute nevole shanghighas je malpropagando, kaj je pli forte oni agas, des pli intense tio eĉ malhelpas.

La situacio de la Esperanto-movado similas al tiu de aliaj organizajhoj kun pli-malpli utopiaj celoj. La "interna" idealismo renkontas eksteran malintereson, kaj tio kauzas frustrighon, malfortighon de la konekto kun la "ekstera mondo", internajn kverelojn, ankau altiron de buntaj au strangaj karakteroj al la movado kaj nutradon de chiuspecaj iluzioj. Ekestas tragika situacio. Trafan priskribon de tiaspeca 'malheroeco' liveras Johano Strasser en sia libro "Der Klang der Fanfare".

Enprincipe ne gravas, ĉu la Esperanto-movado agas lerte au nelerte, ĉar la ŝancoj je sukceso en la "ekstera mondo" estas minimumaj. Restas la "espero", ke la situacio eble malrapide plibonighas. Kaj restas ja la eblo de komunikado inter la anoj.

Kio koncernas la sciencon, mi opinias, ke surprizo eblas. Ĉar ankau en scienco ekzistas subjektivaj tendencoj kaj "modoj", kaj se oni hazarde malkovras la potencialon de Esperanto, tiam povas ekesti nova scienca "modo". Mi ne diras, ke mi tion shatus, sed eble tia stultajho povus havi ankau pozitivan flankon.

Antau nelonge en la gazetaro aperis informo pri junulo, kiu faris genian eltrovon sur la kampo de natursciencoj. Tiun li konigis al 120 usonaj profesoroj. El inter ili 119 tute ne reagis, sed unu sola fakulo priatentis la aferon kaj ĝi farighis granda sukceso. Al mi tio ne shajnas esti escepto, sed tipa kazo. La progreso dependas de hazardo kaj bonshanco.

18.

Mi interesighas pri sukcesoj, ne pri eraroj.

19.

Laŭ mi, unu el la plej gravaj eraroj estas la manko de profesieco. Multaj homoj kredas ke ili mem povas ŝanĝi la mondon sen lerni kiel faras la aliajn :-)

Via enketo estas bonega solvo kontraŭ tiu problemo.

Ni ne sufiĉe lernas nek sufiĉe dungas profesiulojn por konkretigi pli taŭgajn projektojn.

Kiom da libroj ni eldonas amatoj? Kiom da retejoj ni kreas infanece?

20.

- La idealeco de Esperanto estas bazita sur la pasinta tempo.

- Oni devas havi pli da eblecoj praktiki ĝin.

- La nuna sistemo kun lokaj kluboj, asocioj, kunsidoj ne plu estas aktuala.

- Oni ofte taksas Esperanton maldekstra pro la kreado de la lingvo en Pollando.

- Novuloj spertaj en la esperanta movado ne estas rimarkataj lau sia kapablo.
- La esperantistoj ne renovigas siajn malnovajn instancojn.
- Oni konas multe pli fremdajn esperantistojn per iliaj stultajhoj.
- La lernolibroj ne estas aktualaj.
- La Esperantistoj ne akordighas inter si; ekzistas kvereloj inter la homoj, inter la asocioj.
- Esperanto estas belega ideo sed sen la Esperantistoj !

Fine mi skribas :

Aliflanke, oni chiam kritikas la anglan lingvon, sed kial ? Tiu lingvo estas bela !

Oni devas kritiki la homojn kiuj praktikas NUR tiun lingvon !

Kial la popoloj angleparolantaj ne lernas aliajn lingvojn ? Farante tion, iliaj shtatoj shparus tempon kaj chefe monon !

21.

Mi serchas la enketdemandojn kiujn mi povus respondi per jes au ne, sed mi ne trovas en via letero. Mi ne pretas skribi propran artikolon pri la negativajho de esperanto. Tion vi jam faris sufiche abunde.

Mi serchas la eblecojn plibonigi la movadon kaj mi opinias, ke multe da aliaj ankaŭ laboras sur tiu vojo. Chestante lastsemajne la GEK en Nürnberg mi audis la prelegon de Tonkin, kie estas kelkaj bonaj indikoj troveblaj. Li avertis ke ni estu realismaj, kun kio mi plene konsentas. Ankaŭ la lastaj streĉoj de la UEA, turnighi eksteren, estas en la senco kiun mi jam longe propagandis kaj faris.

Dankon por la reta ligo al viaj laboroj, mi komprenis la plejmulton kiel „por“ esperanto. Enlegante en kelkaj de viaj skribajhoj mi trovas ilin kleraj kaj informaj pri esperanto. Bedaŭrinda estas post ĉiu tiu viaj kabeismaj pensoj kaj sentoj.

22.

Ne ekzistas eraroj en movado, kiu dependas de unuopula aktivado. Tiuj unuopuloj kompreneble surmetas sian labormanieron kaj laborstrategion al la ĉirkaŭo. Rezultas el tio kaze de kaze konfliktoj, evidente. Sed simple de tio nutrighas la movado, en bona kaj malbona senco. Eraroj povus nomighi deklaroj ideologiaj pri la rolo de Esperanto. Saghaj homoj fajlas pri pledado por ĝi. Ekzemple la iniciato de la bedaŭrinde daŭre malsana prof. Helmar Frank koncerne la propedeutikan valoron de E-o. Aliaj proponas la lernadon de Esperanto por la aĝa generacio kiel eblon aktivigi la ĉerbajn funkciojn, en maniero tute alia ol ebla per ekz. la angla lingvo.

23.

La plej incita afero estas al mi la sinakuzo de la esperantistaro (mi ne shatas la nomon "movado"), ke esperanto ne disvastighas pro ilia nesufiche efika propagando, komplete ne vidante, ke en la lingvomilito ankaŭ E estas atakata; lerte atakata, ĉar nokte, sekrete, kashe; oni ne aperte luktu kontraŭ ĝi, tio fine vekus intereson; ne, oni prisilentas, kio estas la plej efika sufokilo; kaj kiam hazarde venas favora peto, oni eligas la gurdajhon, ke "ĝi ne havas kulturon". Tiu ĉi lasta stultajho fine estas tre efika, ĉar oni ĝenerale ne scias rebati; oni respondas: "Sed ni havas literaturon, ktp." Ĉar neniu iam vidis ĝin, la falsa argumento fine venkas. Dua parenca kontraŭargumento, kiun mi neniam audis: "Sed esperantisto jam estas angla-; franca, germana-... rusalingvulo, do jam havas la kulturon akiritan de sia denaska lingvo; kiel li povus perdi ĝin parolante E-on?" Mi forgesis mencii (dek-unua riproĉo!), kiom misefika estas la imbecila batalo (sed ĉu vere ekzistas batalo?) inter "finvenkistoj" kaj "raumistoj"; ni ĉiuj estas kaj finvenkistoj (kiu samideano ne esperus al fina venko?) kaj raumistoj (ni ĉiuj uzas E-on tuj, kia ĝi estas nun, sen atendi la mesion, kiun ni tre probable ne vidos antaŭ nia propra morto).

24.

1. Maltoleremo kaj ekstremismo eksteraj rilate al aliaj solvoj pri internacia komunikado kaj internaj kontraŭ E-parolantoj rilate al apartaj konceptoj pri divastigo/aplikado de E-o.
 2. Malrealisma, teoriema deklaro de gvidantoj sen pripensi la tute magrajn homajn fortojn de la movado kaj sen akcepto, ke evidente regas neintereso de grandparto de la homaro pri Esperanto kiel "solvo de la internacia komunikadproblemo", ĉar tiu problemo por preskaŭ neniu homo ekzistas aŭ gravas.
 3. Interna kverelado pri sensecaĵoj, precipe lingvaj demandoj.
 4. Troigitaj esperoj de finfine seniluziigitaj Esperantistoj. Sen ricevi ian rekompencan aŭ investitan tempon, laboron kaj monon – eĉ sentimenton, amon. Sekve ili serĉas kulpul(ar)on por tiu fiasko de sia vivo kaj damaĝas la reputacion de Esperanto.
 5. Ĉar Esperanto estas evidente propono por malplimulto, la movado ofte allogas "unikajn individualistojn" aŭ strangulojn, kiuj bedaŭrinde estas tolerataj de la aliaj movadanoj. Per siaj nekutimaj kondutoj ili damaĝas Esperanton kaj neniu havas la forton kaj la kuraghon forpeli tiujn homojn, kiuj en la "normala" mondo ne sukcesas ricevi rekonon aŭ agnoskon.
 6. Same la movado allogas per sia eteco nefakulojn, kiuj ekz. neniam kaj nenie povus eldoni libron, publikigi muzikajn - sed en Esperanto jes. Ankau ĉirilate (preskaŭ) neniu kuraghas diri la veron pri la fusho. Oni ja felicias vendi ian "internacian kulturon". Estigas per tio ridinda "elito Esperantista": teknikisto skribas poemetojn, sentas sin en Parnaso kaj kondukas kiel mondfamulo grava.
 7. Nenia kulturo pritrakti kritikon internan serioze. Se movadano kuraghas fari tion, komence sen iaj riproĉoj aŭ insultoj, li tuj estas aŭ neglektita aŭ insultata.
 8. Fanfaronado pri neutraleco kaj la defendo de homaj rajtoj, sed samtempe fi-alproksimighi al ŝtatoj kiuj evidente malrespektas grandan parton de tiu ĉi rajtaro. Neutraleco estu strikta. Same la defendo de homaj rajtoj, sen kompromiso. Oni faru decidojn, kiuj vojon elektu.
 9. Sintrompemo: Toleru de prigruloj en la movado, ekz. de ne-respondantaj Delegitoj, nur por savi la statistikon. Evidenta troigado rilate al membro-nombroj, en la varbado pri la simpleco de Esperanto ("nur 16 reguloj"), en listoj pri famaj Esperantistoj, ktp., ktp.
-

25.

Tiu demando rekte scivolemigas min, kial vi interesigxas gxuste pri eraroj (kaj ne atingoj aŭ trajtoj) - ĉu tridek jaroj da movadumado ne montris jam sufiĉajn erarojn persone al vi? ["estIs"] Ĉu necesas pravigoj de aliaj por apostatigxo? Se vi kolektas por iu eseo aŭ libro, laŭ mi ne temas pri privata enketo. Se vi imagas pri listigo de "eraroj" de la speco "elekto de Lapenna UEA-prezidanto", "gratulletero al M'Bow", "Starigo de la Praga Manifesto", "kongresumado en Kubo" kaj simile - tiam temus pli pri spekulativado, ĉar mi ne estas profesia esploristo pri politiko, sociologio, historio ktp. nek profeto, kio aŭ ĉu entute io sxangigxintus, se tiuj ne okazintus.

Nu, jen kolekto, en kiu nature la eroj reciproke influas unu la alian, sed ĉiam validas kaj tiel influas ĉian decidojn aŭ evoluon:

1. Individuaj membroj kaj landaj asocioj

Pro la baza membra individuismo necesus respuguli tion en la asociaj strukturoj: iu monda asocio devus konsisti el individuaj rektaj membroj, landaj (kontinentaj, regionaj, lokaj) asocioj povas ekzisti, sed ne sendepende kaj konkurence al la monda asocio, sed nur subunuoj (ĉu Amnestio havas jure memstarajn landajn asociojn, ne nur sekciojn?)

Tiu skismo UEA/IEL kaj sekva kompromiso do misiris.

2. La lingva bazo

Por esti unueca, ĉiuj devas havi firman lingvan bazon: ne SAT eldonintu PIVon, sed UEA - kaj samtempe fusiĝis la kreo de vere aŭtoritata Akademio, simile al naciaj lingvoj.

Kompreneble individuistoj, redaktoroj, verkistoj povus uzi "kontraŭfundamentan" lingvajxon, sed ili konsciu pri tio, kaj estu klare, kiel gxuste estu. Kiel estas nun, estas granda sxerco: amaso da dumvivaj klikanoj, kiuj neniel pruvigas sian kompetenton, nek antauxenigas ion, sed nur "observas la lingvan evoluon", sen havi ajnan devigan voĉon..

3. Politika neuxtraleco

Limigi sin tiom, ke ne eblas diri ion kontraŭ misajxoj (kaj tamen enhavi "fakasociojn" pri komunismo, ateismo kaj sin batalantaj religioj ktp.) ne povas esti sana aŭ celdirekta: memcenzuro gvidas al kompromisema stagnado. La politika neuxtraleco do ne estis utila.

4. Manko da profesieco

UEA kreis, sed neglektis amason da fakasocioj, dum la plejmulto de profesiaj spertoj kasxigxas kaj ne utiligeblas de la movado. La disaj provoj pri CED, LPLP, TEC, RIC ks. preteriras veran konscion kaj uzon. Kie estas la popularsciencaj verkoj, klerigseminarioj - se ne partopreni privatan klubon AIS aux partopreni seminarion konsistantan el du kursoj kiel astrobiologio kaj usona interna milito: mankas gamo da utilaj scioj kiel ekz. informadiko, modernaj fakoj kiel nanoteknologio ktp. por amasoj, kaj ne nur referenco al elitismaj akademiuloj.

5. Malemo atingi aux teni bonan lingvan nivelon

En la budgeto de UEA kaj ties subunuoj devus esti grandaj provizoj por kursoj, seminarioj - kaj interne por klerigi la aktivulojn kaj funkciulojn, kaj ekstere por instrui neparolantojn. ILEI/UEA/kursoj de landaj asocioj devus uzi samajn oficialajn diplomojn - kaj malaperus la misagordo inter UEA/UEF/GEI/ITK kun tiu KER/KEFR/kio ajn-misagordo. Diploma devus valori cxie oficiale, kaj cxiu funkciulo havu iun sufixan diplomon. Kiu ne volas esti lingve kompetenta, ne estu en gvida pozicio.

6. Manko de unueca celo

"Unueco estas forto" - necesus iu dauxra adapto de la rimedoj atingi sian celon, per diskuto, kunlaboro kaj demokratio, ne ideologia apartigo: SAT eble estis evitebla - aux UEA igxintus simila, kun komunisma frakcio, ekologia frakcio, lingvoprotekta frakcio...

Jen alte spekulativa punkto, kiu bezonas entuziasmajn, sed prudentajn gvidantojn.

7. Desuprismo kaj desubismo

Ligi sin tiom al UN(ESCO) kaj espri de tiom malforta asocio subtenon estis vana iluzio. Same politikistoj de naciaj sxtatoj sentas sin devigataj ne de internacia homfratigxo, sed propraj interesoj, kaj poste iomete de la propra lando - kiom ajn allogas la ideo pri rapida venko tra oficiala "adopto".

Pli celkonforme estintus konvinki la komercon: se Coca Cola, Microsoft, Apple, Nike subtenus Esperanton - ecx nur kiel modon -, tio multe pli disvastigus la lingvon.

8. Netravideblo kaj maldemokrateco

Mankas eblecoj diskuti kaj dauxre auxskulti la bazajn membrojn: ne estu A-, B- kaj similaj komitatanoj, sed forumoj, popoliniciativoj dum ekz. UK kaj grandaj arangxoj, sed ankaux rete.

Kaj cxefe estu raportado pri atingoj kaj facila ebleco anstatauxi dormantan delegiton/komitatanon/komisionanon, kiu traktas Esperanton kiel malpli flankan aferon ol la propran karieron..

9. Enspezoj

Jen malpli eraro de la movado, sed pli propono al estonteco: se la membrokotizo ne estus fiksa sumo (tiu malfelicxa divido en A-/B-/Soc-/Evolulandojn), sed depende de propra enspezo (ne eblus grande kontroli, necesus fido), ekz. 0,5% de la monataj rimedoj - tiam estus sxanco al multe pli da homoj en malpli ricxaj landoj plene membrigxi kaj partopreni la asocian vivon, se jam foje estas tia diskuto.

10. Lokeco

Ne estu cxefe unu pinta arangxo en foraj, kostaj landoj, kie kunvenas jaraj asembleoj de subunuoj, sed estu pli oftaj, malpli grandaj arangxoj en pliaj lokoj - kaj komprenu sin kiel parto de UEA/la movado.

Estraranoj devus partopreni do ankaux en tiaj kongresoj, kaj ne nur en euxropo.

11. Klikeco

Cxu en estraroj, cxu en la literaturo, cxiam la samaj reciproke citas sin kaj verkas dikajn gratullibrojn kun artikoloj, kiuj ofte tute ne rilatas al la omagxato, sed nur donas plian forumon por akumuli "famon".

Arangxoj kiel IF, JES, IJK, sociaj retoj kiel Ipernitio, Vizagxlibro ... konsistas el amikaroj, kiuj cxefe rilatas inter si, kaj malfacilas al eksterulo penetri ilin. Tio certe estas unu kialo kabeigi iujn aux deteni de enmovadigxo.

12. Kolekto da stranguloj

Cxiu, kiu iom partoprenas en la movado, rimarkos tiajn tipojn - malgraux Frostavalaj Principaroj, kampanjado kontraux stelumado, flagumado, sektemumado ktp.

Aliflanke: ne mirindas, ke stranguloj altiras sin reciproke - kaj mi diras, ke senescepte cxiu estas iusence strangulo: iu pli ekstravagance vestas sin, alia pli dande agadas, tria havas eksternorman hobion - komunajxo de cxuij estas iu ligo al Esperanto (kiu mem havas tro diversajn signifojn al cxiu, vidu la neparolantajn "Amikojn" de Esperanto).

13. Troa polusigo

Kial necesas decidi, cxu oni estas "Finvenkisto" aux "Rauxmisto", cxu UEA estu politike "neuxtrala" aux des pli politikumu, cxu bazigi siajn financojn sur fondajxojn aux perej, cxu kapitalisma aux komunista?

Cxiu agu laux siaj kapabloj kaj emoj - vidu Jutubon, kie trovigxas kaj esoterikuloj, kiuj kredas en liberan energion el la kosmo, eksterteranoj kaj vuduon, kaj eksplodanta kvanto da klerigajxoj pri kemio kaj fiziko; kaj Lady Gaga kaj Volker Pispers.

26.

Lau mi, la ĉefa eraro/malbono estas la uzado de la supersignoj.

Forigu ilin ĉiujn! La majstro ne kulpas. La akademio kulpas. La majstro tute ne povis antaŭvidi la fenomeno de la komputilo, do, li ne povis konsideri la problemon. Por solvi la komputilan problemon, la akademio enkondukis la uzadon de la du (ne unu) sistemoj: la aldonon de "h" au "x" post la litero. Sendube, tiu ĉi estas sango. Tamen, citante la fundamenton, la akademio malpermesas la forigon de la supersignoj-diversa sango, sed ankau sango! Krome, la du permesitaj sangoj (h kaj x) aspektas tre malbele, eĉ horende!

Por komenci mi proponas la jenajn anstataŭojn: c per ts; ch/cx per simpla c; gh/gx per j; j per y; jh/jx same per j; sh/sx per x; kaj hh/hx per kh. Vivanta lingvo devas kreski sed tio necesas sangojn.

27.

1) Uzi kiel propagandan/varban ilon la sloganon "Esperanto estas facila". La fakto, ke Esperanto estas planlingvo, t.e., produkto de "inteligenta dizajno" kaj ne de natura evoluo laŭ la maniero de la etnaj lingvoj, estis mise kaj erare interpretita en la menciita slogano, kiu kreis falsajn esperojn en la allogitoj kaj amarajn elreviĝojn en tiuj kiuj ne dediĉis sufiĉajn fortojn/tempon al studado kaj regado de la Internacia Lingvo.

2) Ne starigi stabilajn kaj vivkapablajn klerigejojn, respondecajn pri kontinueco, konservado, eldonado kaj disvastigado de la kulturaj kaj klerigaj valoroj (kursaroj, seminaroj, literaturaj foiroj [tute ne LF!], ktp) neneeble kreitaj dum 125-jara evoluo. La manko de tia institucia subteno preskaŭ devigas reinventi tiujn atingojn ĉiun jardekon.

3) Ne krei sufiĉajn lernomaterialojn por personoj kiuj volas lerni diversajn sciencajn kaj teknikajn fakojn per Eo. Tiaj materialoj estus alloga varo por homoj en evolulandoj, kiuj dum longe ne havis aliron al sufiĉe altkvalitaj lernomaterialoj, kaj kiuj daŭre ricevas ilin en la t.n. kulturlingvoj: angla, franca, hispana, rusa, ktp.

4) Asimili kaj apliki al si mem trajtojn kiuj apartenas nur al etnolingvoj. La ĉefa avantaĝo kaj intereso de Esperanto, krom ĝia planita estiĝo, estas ke ĝi ne estas etnolingvo, ke ĝi ne estas historie ligita al aparta etna grupo. Indas rimarki, ke Eo estas ja forte ligita al la eŭropa historio kaj kulturo, tiel alia eraro estus.

5) Emi kaŝi aŭ malgravigi la eŭropecon kaj eŭropocentristajn trajtojn de la lingvo kaj de la movado.

6) Malrapidi en la adoptado kaj adaptiĝo al la nova komunika ordo starigita de la interreto kaj de ties rilataj sociaj retoj.

28.

1- ne sufiĉe da mono en la retmovado

2- ne sufiĉe da atento al la junuloj

3- ne necesas eldoni paperan jarlibron

4- ne sufiĉa ligiĝo al Amnestio Internacia, Greenpeace kaj aliaj internaciaj organizoj

5- multaj kritikis la aktivulojn sed nenion faras

6- multaj estas eternaj komencantoj

7- multaj iras al kongreso sed krokodilas

8- multaj elektighas en estraro de landa asocio sed nenion faras poste

9- multaj neniam legas ion en esperanto

29.

Mi ne povas kaj ne volas „konkrete respondi pri eraroj de E-o movado“. Unue, ĉar mi ne trovas min sufiĉe kompetenta due, mi ne shatas unusignife kritiki, ĉar tio ekas nur dialektikan kontraŭecon, sed ne akcelas iun solvon. Mia metodo estas nur analize montri al nesufiĉeco, tiel instigi plipensadon kaj eble pozitivan kompletighon. Mi povas nur ion supozi, sed por konkreta kritiko, kiu postulus ankau konkretan solvon, mi ne sentas min sufiĉe suverena.

Alikaze, erarojn „difini“ helpas nur al kontraŭuloj. Mi ne volas esti sur tiu flanko. Pri la eraroj de esperanto jam estis multe skribite, precipe de kritikistoj, kiuj volis sin mem supermeti kaj eĉ konstrui iun novan lingvon (plejnovе ekz. Klaus H. Dieckman). Tiuj malriĉuloj pensas ankoraŭ pri la maniero de la klasika lingvistiko. Ili ankoraŭ ne komprenis Noam Chomsky. Ekz. Dieckman volis konstrui „perfektan novan lingvon“.

Sed la realeco okazas malgraŭ tiuj subjektivaj geniuloj, simple en la ĉiutageco. Ekz. la angla akiris sian mondvastecon ne pro tio, ĉar ĝi estas perfekta, sed ĉar ĝi estas malferma kaj fleksebla. Proprajhoj kiujn esperanto eĉ pli havas ol iu ajn alia lingvo, sed kio ne estas sufiĉe konsciata.

Inverse, kelkaj esperantistoj volas atingi klasikajn valorojn, anstataŭ tiujn subigi. Pli bone estus se ili lernus de la angla, anstataŭ kritiki ĝin. Ĉar esperanto havas paralele, (ne kontraŭe) kelkajn karakterojn eĉ pli bonajn (ekz. demokrateco, malfermejo, fleksebleco).

Esperanto ekestis en fleksata diverseco kaj tiun proprajhon ĝi devus pluevoluigi, per konstruo de novaj inter-ecaj formoj, esprimoj, vortoj, restante racie komprenebla. Ĝi devus atenti, ne fari la saman eraron, kiun la naciaj lingvoj tra ilia literaturo kaj poezio faris. Tiuj retenighis en iu proprajho (idiomoj kaj idiotismoj) ĝenerale ne komprenebla kaj ne tradukebla en aliaj lingvoj.

Bone, ni lasu tion al naciaj lingvoj. Sed esperanto devus defendi la propran karakteron, kio estas la racie pensebla inter-eco kaj en tiu ekestinta novo, kiu devas esti mondvaste komprenebla. Esperanto purigas sin mem de idiotismoj, per sia inter-eco, ĉar se la aliaj ion ne komprenas logike, ĵus venas la protesto de alinacilingvanoj.

Esperanto ne devas postkuri la klasikecon de naciaj lingvoj. La plimulto de ili mem atingis ne pli tro longe ol 250 jaroj, sin enfleksinte la regulojn de la latina. Esperanto mem jam evoluas 125 jarojn, kaj ĝi ne kovras sian kunmetitecon kaj devenon el diversaj aliaj eĉ klasikaj lingvoj. Ĝis la naciaj lingvoj signas skismon. Unuflanke ili volas resti „puraj“, aliflanke ili mem devas alpreni esprimojn kaj nociojn el diversaj aliaj lingvoj, se ili volas kapabligi la sciencojn.

Esperanto tute ne havas tiun problemon. En relative mallonga tempo ĝi evoluighis al plenuzebla lingvo en ĉiuj vivterenoj. Per ĝia racieco kaj logika klareco, ĝi estas aparte kaj prefere uzebla en la scienco kaj ĉie tie kie necesas la pensado.

Nun, kiel mi nomu tie la ERARON?

Mi diru, se oni ne perceptas la realan valoron de esperanto, sed volas per la klasika idealismo ion atingi kio tute ne kongruas kun ĝia karaktero. Ekz. fina venko, anstataŭ aliajn lingvojn, regi la popolon, apartigi, ktp.

Nuntempe estighis la problemoj, ke la fino de la idealismo estas pensata kaj ankau science ekkonata, sed la mondo ankoraŭ ne tute konscias pri tio kaj pro tio ĝi tovighas en skismo. Kio ankau signas la esperantistojn kaj ilian movadon. Unuflanke ili ankoraŭ ĉiam parolas pri grandaj „idealoj“, ili volas esti „klasikaj“, ofte eĉ „heroj“, sed aliflanke ili ne ekkonas ĝuste tion kio esperanton faras valora kaj favora.

Nun, „eraro“ estas, se oni volas perforti la skribajhojn en esperanto per klasikaj reguloj kaj plenigi la ne plu tempadekvatajn atendojn de la publiko. Esperanta literaturo ne devas konkuri kun naciaj literaturoj, ĝi ne bezonas tion, ĝi povus pli kaj havas en sia inter-nacieco pli da eblecoj krei kaj uzi novajn formojn ol ĉiu alia nacia literaturo.

Memkompreneble la verkistoj devas ankau ĝuste elekti la temojn, kiuj estas tutmonde klerigendaj, ne nur tiujn kiuj estas loka interesaj kaj kompreneblaj. Ili devas esti liberaj de naciaj idiomoj kaj idiotismoj, por esti tutmonde kompreneblaj, sed por kiuj jam la spirita memmehxaniko de esperanto devas zorgi.

Fakte mi opinias ke, la eraro de esperantistoj tute ĝenerale kushas en tio, ke ili ne komprenas ĝuste la nuntempon kaj pro tio ne la aktualecon de esperanto. Sed tio ankau ne estas nur esperantista manko, sed oni trovas multe da homoj en la nuna socio kiuj ankoraŭ pensas en pasintaj kategorioj. Multaj volas remeti la historion en iu, por ĉiu mem konvena antaŭa tempo, anstataŭ akcepti la realecon en la evoluo de la historio kaj lerni de tio, au alie dirite; serioze preni la tempon.

La nunan realecon per nia antaŭa idealisma pensmaniero ni tute ne povas kompreni. En antaŭaj, historiaj tempoj ni ĉiam solvis tiun problemon heroece. Sed nun ne plu eblas. Pro tio neniu alia alternativo restas en la nuna mondo, ol akcepti la realan fakton. Nature, ĉiam ke la kondiĉo, ke ni volas plue lasi ĉeesti la estantan, sed ne detrui nin mem kaj la ĉirkaŭajhojn.

El nenio nur dio povas fari ion. Ni ne supertaksu nian povon. Ni bezonas la tradicion kiun esperanto havas. Jam Zamenhof kreis el la tradicio kiu en la historio evoluighis. Interreto estas tute en la senco de esperanto disvolvigho.

Sed tio ne signifas ke la antaŭaj strukturoj estus detruendaj. Ankaŭ post la detruo eblas surkonstrui, sed ni jam havas la sperton, ke tio estas multe pli pena, ol renovigi. Landaj asocioj, lokaj kluboj kaj UEA havas jam sian historion, el kiuj eblas lerni kaj plibonigi.

Ni estu atentaj, interreto estas granda evoluebleco por esperanto, sed ne solvas chiun problemon. Nuntempe ankoraŭ ne estas tute ekkoneblaj la malfacilajhoj, sed ili jam parte mendighas. Por resti tuta homo ne sufichas nur aŭdvidaj kontaktoj, sed necesas ankaŭ senperfizikaj vidajhoj.

Chiu nova iniciato, (kiu ne restas nur granda Ideo), chiuj projektoj kiuj realighas, disvastigas kaj pluevoluigas esperanton. Sed, ankaŭ tie oni devas atenti, ke tiuj movadoj ne restu nur en si mem, sed ili devas flegi la kontakton ankaŭ kun aliaj partoj kaj samtempe kun la tuto.

Grava demando estas, kiel tion per novaj, aŭ renovigitaj strukturoj en la esperantomovado atingi? Ne sufichas nur diskritiki chion ghis nun estantan kaj nur detru, sed kiel fari ke estu pli bone? Kiel kunigi tiujn patigitajn sukcesojn movadajn, ke ili kune povus montri la vivkapablon de esperanto?

Ke mi ne restu nur che demandoj, mi provas ankaŭ kelkajn respondojn: Sufiche ĝenerale konata valoro estas, ke en chiu movado kun iu konvinko al iu celo gravas la unueco de la membroj. Kaj chiam pli da subtenatoj ekzistas, despli potenca povas esti tiu unuigho.

La esperanto-movado konsistas el tre diversaj homoj, ech tutmonde, kiujn tre malfacilas kunigi. En la historio jam estis kelkaj provoj tutmonde unuigi homojn kun similaj interesoj. Ekz. „Proletaroj de la mondo unuighu!“ Tio tute fiaskis, ech efikis inverse, la tutmondistoj estis persekutitaj.

Sed tio tamen ne signifas ke homoj kun similaj interesoj tutmonde ne estus unuigeblaj.

30.

Mi povas al vi diri, ke mi vidas unu grandan eraron pri la movado, kaj tio estas la ena varbado. La varbado por renkontighoj inter Esperantistoj kaj la movado por si mem, ne por Esperanto, la lingvo, kaj ĝiaj celoj. Oni multe agas ene, kaj malmulte eksteren.

Kaj chiu ajn eraro venas de tiu ĉi baza afero.

(Mi supozas, ke estas pluraj respondoj por la kialoj, sed tio estas baza eraro.)

31.

Ĉu la Esperanto-movado faris dek erarojn? Mi povas nomi nur unu: homoj agas tro individue, multaj deziras altrudi siajn opiniojn kaj "plibonigojn" kaj chiu virkoko bezonas sian komposhton. Tial la fortoj de esperantistoj kaj de la movado disdividighas inter la malsamopiniantoj.

Lau mi Esperanto estas avangarda lingvo kaj troviĝas inter esperantistoj ankaŭ neegoismaj laboremaj idealistoj, sed mankas fokuso, koncentriĝo, vera kunlaboro kaj - tion oni ne povas nei - profesiaj scioj kaj kapabloj. Sed se la "neprofesiaj" idealistoj ne laborus, nenio bona estus atingata.

Ni ne kulpigu ilin pro ilia idealismo kaj sindedicho.

32.

- La celo de la partoprenantaj individuoj en la movado ne egalas al la celo de la tuto. La formala celo de la movado estas disvastigo de la lingvo kaj de ĝia uzado, tamen mankas ec la bazaj merkatakaj strukturoj por plenumi tion. La celo de la individuaj esperantistoj estas akiri personajn avantaĝojn (trovi kompanion, socian komunumon, aŭ akiri titolon aŭ rangon en organizajo, sukcestravivaĵon kompensantan la malsukcesojn en la civitana vivo, aŭ elformadon de persona internacia kontakta reto, agadi en sia persona placo-tereno, ktp.) - La du celoj ne identas, kaj mankas forto/strukturo kuniganta ilin.

- Negativa selektigo de gvidantoj, kaj en landa kaj en loka nivelo. Kleraj kaj kapablaj homoj faras karieron en eksteresperantuja mondo kaj forlasas la movadon. Restas nur tiuj, kiuj ne kapablas/-us fari sukceson en la ekstera mondo. Vidante rezultojn de ilia agado, foriras ek la restinta tavolo de kapablaj intelektuloj - ekestas spiralo... (Kompreneble tio validas kiel fenomeno, kaj ciam estas kelkaj esceptoj pri individuoj.)

- Alveno de totala globaligo kaj de interreto (komunikada revolucio) rezultis fundamentajn sangojn en la vivo, sed Esperanto-organizajoj ne kapablis adaptigi je tio. Kaj la funkcia strukturo kaj la interna ideologio de la movado principe restis sensangaj.

- Post la falo de Sovetunio kiel balanca superpotenco, sur la podio restis nur Usono, kaj praktike ĝia lingvo igis "LA" internacia lingvo. La Esperanto-movado ne kapablis konkurenci, kaj ĝia kauzo estis nur parte financa: en la movado mankis la merkata "mondpercepto", ĝiaj gvidantoj ne kapablis esti manageroj... - La hodiaŭa pozicio de la angla lingvo rezultis ek modifigon de la tuta Esperanto-movado (anstataŭ la disvastigaj celoj hodiaŭ oni celas nur "resti vivaj"...) -----

Kompreneble oni povas simpligi la aferon kaj mencii konkretajn fenomenojn:

- Manko de merkata mondpercepto, oni ne pensas pri la tuto de iu projekto, nur pri unuopaj detaloj;

- Kiel sekvo de tio mankas reala strategio kaj cxe lokaj kaj cxe internaciaj organizajxoj;

- Amatoreco, diletantismo cxe pluraj gvidantoj, aktivuloj. -- Gvidado de E-organizajoj postulas la samajn kapablojn, kiel gvidi entreprenojn. Tiuj manageraj, financaj, juraj, merkataj, organizaj scioj mankas ce plejmulto de E-gvidantoj, kaj tio speguligas en la movada agado.

- Persona envio pro sukceso de najbaro...

33.

1) Financa dependeco: la esperanta movado ege dependas de sponsoroj kaj kotizoj kaj ne vere klopodas havi aliajn enspezoŝtatojn, ĝi estas ĉiam en krizo, sed ne volas ŝanĝi sian financon modelon por elkriziĝi.

2) Miksado de esperantismo kun aliaj ideologioj. Tio forigas novulojn kiuj ne konsentas kun ili kaj samtempe misreklamas esperanton. Same, estas esperantistoj kiuj konsideras sin "superhomoj" ĉar ili, krom esperantistoj, ankaŭ estas anoj de alia movado, politika ideologio aŭ religio.

3) Monprofito kiel peko: diversaj esperantistoj ne toleras la ideon uzi esperanton por gajni monon kaj persekutas aŭ/kaj bojkotas iniciatojn kiuj celas disvolvi esperantan ekonomion, kiu tamen estas la nura maniero enkonduki esperanton en la internacia komerco, lernejoj, registaroj, diplomatio, ktp.

4) Amatoreco. Ĝi estas kaŭzita de la pasinta eraro: se ne indas monprofiti de esperanto, do ne eblas havi profesiajn aktivulojn por sindediĉi ekskluzive al la movado.

5) Malinteresiĝo pri kapabliĝo. Malmultaj esperantistoj kiuj instruas esperanton interesiĝas pri partopreno en kursoj kiuj celas kapabliĝi instruistojn. Same, esperantistoj ĝenerale ne emas studi pri lingvistiko, pri historio de esperanto, pri esperanta kulturo, ktp. kaj tiel ili ne kapablas bone respondi al demandoj pri esperanto.

6) Vertikala strukturo. La bazo de nia movado estas la esperanto-kluboj, dum en la pinto de la piramido estas UEA. Danke al tiu vertikala strukturo, multe da mono kaj laborfortoj estas malŝparataj vane, ĉar ĉiuj organizaĵoj devas prizorgi burokrataĵojn kaj agadas unuope en similaj projektoj sen interŝanĝi spertojn. Nia movado estus pli efika profitante interreton por kunigi fortojn, interŝanĝi spertojn kaj organizi la agadon.

7) Misuzo de statistikoj. Esperantistoj uzas statistikojn pozitivajn pri esperanto por diskonigi la lingvon, sed ne zorgas pri produktado de statistikoj celante diagnozi la situacion de la esperanta movado, kaj preferas sekvi kadukajn modelojn anstataŭ uzi sciencajn rimedojn por fari strategiajn investojn.

8) Reinventado de la rado. Ĉiam kiam ŝanĝiĝas la estraro de iu organizaĵo, la nova estraro sindediĉas al lernado pri kiel la organizaĵo funkcias. Same okazas rilate al volontulaj laboristoj, kiuj iom post iom lernas kiel funkcias la organizaĵo, kaj kiam ili finfine lernas estas tempo por foriri, sen kapabligi la anstataŭantojn.

9) Prioritatoj. Plejmulto de rimedoj de esperanto-organizaĵoj estas uzataj por okazigi kongresojn kaj por la eldonado de revuoj, kiuj tamen estas la nuraj kialoj por ke homoj aliĝu. Sed, se la movado okupiĝas ĉefe pri la esperantistoj, esperanto daŭre restos konata de malmulte da homoj.

10) Miskompreno pri la signifo de neŭtraleco. Pluraj esperantistoj, nome de neŭtraleco, senmovigas la movadon. Neŭtrala movado signifas, ke ĝi estas politike neŭtrala, t.e. ĝi ne apogas politikajn ideologiojn nek partiojn, sed ĝi ne devas apartiĝi de politikaj diskutoj, ĉar nur per ili, kaj per kunlaboro kun popolaj iniciatoj kaj aliaj movadoj eblas atingi la finan venkon.

34.

Bedaŭrinde mi ne scias respondon, ĉar mi ne scias, kio estus "LA Movado".

35.

1. Necesis proponi E-on kiel la 1-an lingvon por cxiuj, sed ne kiel la 2-an;
 2. Cxiam necesas montri al la publiko la avantaĝojn de E-o kompare kun la naciaj lingvoj, sed ne silenti pri tio.
 3. Necesas konsideri, ke pli multaj e-istoj ne estas movadanoj kaj ne okupigxas pri disvastigo de E-o (kio estas tute normala), sed nur gxuas sian vivon en la E-lingvio.
-

36.

1. Oni miksas tro da aliaj personaj preferoj kun la lingvo (ekz. vegetaranismo, ekologio)
 2. Ofte mi havas la impreson ke kelkaj havas sektecan konduton
 3. Kelkaj uzas Esperanton kiel "Ersatzreligion". Sxajnas ke tio estas rezulto de la Zamenhofa mesiismo. Mi persone preferas la logikan tradicion flanke de la francoj ekde la komenco de la 20-a jarcento.
 4. Mi kiel germana civitano absolute ne havas komprenemon por la kontrauxcionismo en la movado, kiu ofte estas simpla euxfemismo por intelekto kovrita kontrauxsemitismo. Sxajnas ke por tiuj samideanoj la araba naciismo estas progresema, sed la juda/israela naciismo estas fasxismo almenaŭ dekstremisma.
 5. La euroxcentrismo de la vortaro.
 6. La kontrauxusonismo aux gxenerale la lingva anglofobio.
 7. Mi miras kial gxis hodiaŭ ne okazis UK en Ruslando. Cxu la rusa movado estas tiel eta, aux cxu oni simple rigardas Putin kiel monstren? La kongreso okazis en Pollando kaj Hungario dum la komunisma epoko, en Pekino kaj Havano (mi absolute konsentas kun tiuj decidoj). Mi ankau sxatus se la UK okazus en Usono.
 8. Oni devus pli substreki la propedeŭdikan avantaĝon de Esperanto.
 9. Bedauxrinde en la germana lingvo vortoj kiel "Esperantogeld" havas malbonan signifon. Por mi (kiel por Zamenhof) Esperanto ne estas universala lingvo sed internacia lingvo (inter nationes).
 10. Kiel je la komenco la kristanoj kaj komunistoj, cxiu generacio esperas ke la fina venko venas dum la propra vivotempo. Sed la ideo de la paruzio cxe la kristanoj estis fiasko.
-

37.

"Erarojn" oni nur povas difini se oni havas ideon pri la celoj de la movado, kaj se oni traktas la movadon kiel aganton. Mi ne multe pensis pri la celoj, kaj mi nur konas la junularan movadon. Mi multe ĝuis la aktivecon en TEJO kaj en lokaj junularaj grupoj. IJK kaj la lokaj kongresoj havis bonan mikson de festo, instruoj kaj konatiĝoj. Do, por la ĝuado de mi kaj aliaj, ĝi ne multe eraris, certe ne estas 10 grandaj eraroj. Eble la sola estas ke laŭ mi TEJO povus esti pli bone organizita. Kio estas "pli bona" mi eĉ ne havas bonan difinon.

Zlatko Tishljar utiligis la la enketan demandon pri la eraroj de la Esperanto-movado por amplekse mediti pri la temo en Europa Bulteno:

<http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=396&filename=eb-127-05-2013.pdf>

Eblas aldoni pliajn komentojn.

Fine estu aldonitaj la vidpunktoj pri eraroj de www.planlingvoj.ch:

1. Disvastigo de mitoj kaj legendoj, historiaj duonveroj, falsoj kaj mensogoj pri Zamenhof, planlingvoj kaj Esperanto. Troa fokusado al la poleco de L.L. Zamenhof kaj troa ligiteco de Esperanto kun Pollando kiel naskighlando de Esperanto. Lige kun tio, subpremado kaj prisilentado de la judeco de Zamenhof. Kio kondukis al falsaj historiaj perceptoj kaj malhonestaj asertoj pri identeco ktp.
2. 'Finvenkisma', t.e. blufa, troigita kaj nerealisma propagando de Eo (troa fokusado al dubindaj asertoj, hipotezoj kaj konceptoj kiel "facila lingvo", "neutrale lingvo", "lingvo de paco, justeco, amikeco ktp.). Kio kondukis al falsaj imagoj kaj seniluziigoj che uzantoj de la lingvo.
3. (Propagando de) radikala 'reakcia' alternativismo, fanatika entuziasmo (au idealismo) kaj utopiismo. Intermiksado de Eo (esperantismo) kun aliaj ideologioj (kaj religioj). Kio kondukis al forpusho de publikoj, kiuj kredis, ke Esperanto estas sekto.
4. Kritiko kaj polemiko kontraŭ (la hegemonio de) la angla lingvo) cefe por ataki Usonon, la kapitalismon kaj la valorojn de la Okcidento. Lige kun tio: kontraŭ-cionismo (Israelo) ktp. Kio kondukis al stulta kaj senespera batalo kontraŭ fortoj kaj realecoj en la mondo, kiuj estas nur malfacile kontraŭbatalleblaj.
5. Troa maldekstrismo de la movado kaj fatala sistema integreco de la Eo-movado en la socialismaj reghimoj de la Malvarma Milito. Troa proksimeco kaj flatado de komunismaj shtatoj. Kio kondukis al tio, ke el la 'neutrale' lingvomovado farighis maldekstrisma politika-ideologia propagando-movado und paranojaj trajtoj.
6. Malhonestaj kaj hipokrita (nur formala) rilato al homaj rajtoj anstataŭ ilia aktiva subtenado. Shajnigo de trajtoj kiel pacmovado, kia la Eo-movado fakte ne estas (la Eo-movado faris nenian konkretan kontribuon al la monda paco kaj al la homaj rajtoj, sed male subtenis ideologiajn reghimojn, kiuj grandstile lezis la homajn rajtojn). Aserti, ke Esperanto mem estas la projekto de la paco, estus tro naive kaj tro simple.
7. Totala manko de memkritiko en la propraj vicoj kaj neekzisto de kapablo reanalizi la propran situacion de tempo al tempo. Utiligo de la interlingvistiko kaj esperantologio por senkritika pravigo de la "supereco" de planlingvoj kaj Esperanto. Kio kondukis al falsaj konkludoj, strategioj kaj agadoj, kaj al forpusho de racie pensantaj homoj, kiuj kritikis devojigajn.
8. Ignorado, suspektado kaj nenormala rilato vidalvide de la "ekstera mondo", anstataŭ fruktodona kunlaborado kun ĝi. Lige kun tio: manko de merkataka kaj komerca sinteno. Kio kondukis al tio, ke ofte la kunlaboro kun la „ekstera mondo“ ne povis okazi kaj ke multaj produktoj kaj kreaĵoj de la „ekstera mondo“ ne povis esti „esperantigitaj“ (ekzemple tradukoj de beletra kaj faka literaturo).
9. Lige kun 8: Ĉiuj iom gravaj kaj signifaj homoj de la "ekstera mondo", kiuj ne senkondiĉe apogis Esperanton, estis konsiderataj kiel malamiko de Esperanto.
10. Supertakso de la signifo de Esperanto kaj truda klopodado konvinki diversajn (shtatajn kaj neregistarajn) instancojn pri la supereco, utileco, neceso ktp. de Eo. Kio kondukis al negativa reago flanke de tiuj instancoj.
11. Neokazo de adapto kaj redifino de la propra identeco post 1990.
12. Supertaksado de la rolo de la interreto por la renovigado de la Eo-movado.

Ĉiuj tiuj faktoroj kondukis al tio, ke Esperanto estis apogita nur de tre malmultaj signifaj personecoj de la mondo kaj ke ĝi povis esti uzurpita kaj misuzita de la unuflanka politika propagando, cefe komunisma, totalisma, 'reakcia', kontraŭ-angla ktp. La plej ĉefa eraro de la Eo-movado eble konsistis en tio, la ĝhiaj anoj toleris tiujn farojn kaj nenion, au tro malmulte faris por eviti ilin. Sub tiaj kondiĉoj okazis, ke la reputacio de Esperanto estis grandparte ruinigita en la (demokratia kaj libera) mondo.

Mi esperas, ke per tiuj klarigoj mi povis montri la principan diferencon inter (specifaj) *eraroj* kaj *problemoj* kiuj estis menciitaj (kiel amatoreco kaj dilentanteco, stranguloj, malbona kono de la lingvo, personaj ambicioj, movadaj kvereloj, malaktualaj lernolibroj, troa idealismo au manko de idealismo, reinventado de la rado ktp. – ĉi tiuj problemoj kaj fenomenoj, kiujn oni apenau povas eviti kaj kiuj cetere ekzistas ankau en homaj organizajhoj ekster la Eo-movado, estas sekvoj, konsekvencoj el faritaj eraroj specifaj por la Eo-movado).

(Komparu kun: http://www.plansprachen.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf)

Publikigita la 12an de junio 2013 sur www.planlingvoj.ch